MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO

5

MAJO 2024 Kol. 467/40

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: Ĝuu Esperanton, Zamenhof-ekspozicio, 110-UK, Bayreuth, 2-a Bulteno por Aruŝa, Krakova societo, UEA – 4700 membroj.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Ĝuu EsperantoN

Sabate la 23-an de marto kunvenis en Pardubice grupo E-mental ´ kun membroj de la E-klubo Pardubice okaze de la aranĝo „Ĝuu EsperantoN“. Kiel gasto partoprenis ankaŭ la hungara esperantistino Adrien. La vetero estis afabla al ni. Ni faris „Paskan vojeton“ sur Kastelremparoj kaj ni lernis signifojn de unuopaj tagoj de la Paska semajno. La tutan tempon nin akompanis pavoj, kiuj estiĝis integra parto de la kastelo. Ni tagmanĝis en nepala restoracio kaj poste ni jam



konkuris en la ludo „mölkky“ – finnlandaj kegloj. La teamo E-mental´ venkis 😊.
La kunveno finiĝis en la kafejo Bajer, kie krom manĝi kaj trinki ni studis E-gramatikon, precipe akuzativon.
Ni jam nuntempe antaŭĝojas la sekvan lecionon 😊

S. Nováková

## Zamenhof-ekspozicio: unika longtempa projekto en Litovio

Jam la sepan jaron daŭras unika informa projekto en Litovio – migranta ekspozicio pri la vivo kaj agado de Ludoviko Zamenhof. Ekde 2017 ĉi tiu ekspozicio, profesie preparita de Pola instituto en Vilno kaj de Litova Esperanto-Asocio (LEA) okaze de la centa datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof, estis eksponita jam en 45 urboj de Litovio. Kutime ĝi estas eksponata en publika biblioteko de la koncerna urbo kaj distrikto, kulturcentro aŭ loka muzeo.

Dum la pasinta jaro ĝi estis vizitebla en la kulturcentro de Kuršėnai, en la regiona muzeo de Kelmė, en la kulturcentro de Naujoji Akmenė, en la kulturcentro de Mažeikiai, en la publika biblioteko de Plungė, en la publika biblioteko de Telšiai kaj en la publika biblioteko de Skuodas. Nun ĝis la fino de marto ĝi estas eksponata en la publika biblioteko de Rietavas.

La prezidanto de LEA Povilas Jegorovas donacis unu ekzempleron de la enciklopedio *Nia diligenta kolegaro* al la publika biblioteko de Rietavas.



Laŭplane ĝi estos eksponata en ĉiuj 60 distriktaj urboj de Litovio kaj en kelkaj aliaj urboj. La ekspozicio samtempe estas multe pli vasta informprojekto pri Zamenhof kaj Esperanto ĝenerale. En ĉiuj koncernaj urboj ĉiam aperas ampleksaj artikoloj pri Ludoviko Zamenhof kaj Litovio kaj pri Esperanto ĝenerale. Tiuj artikoloj kutime aperas en paperaj gazetoj de tiu urbo aŭ distrikto, en retejoj de tiuj urboj, urboadministracioj, kaj de tiuj institucioj, kie okazas la ekspozicio. Foje tiuj informoj aperas ankaŭ en lokaj radioj kaj televidoj. Kelkfoje okazas publikaj aranĝoj okaze de la malfermo de la ekspozicio. La ekspozicio daŭros ankoraŭ dum kelkaj proksimaj jaroj.

Povilas Jegorovas

## La 110-a UK okazos en 2025 – en BRNO, ĈEĤIO!

Por la 110-a Universala Kongreso de Esperanto la Estraro de UEA elektis Ĉeĥion kiel kongreslandon. UK okazis en Ĉeĥio dufoje, ambaŭ kongresoj estis en Prago (1921 kaj 1996), nun unuafoje kongreso estos en Moravio. La gastiga urbo por jaro 2025 estos Brno kun ĉ. 400 000 loĝantoj, ĝi estas la dua plej

granda urbo de Ĉeĥio, en la sudorienta parto de la lando. Brno fondiĝis en 1243 kaj do havas riĉan historion kaj interesajn vidindaĵojn. Ĝi estas la historia ĉefurbo kaj plej granda urbo de Moravio, hodiaŭ funkcianta kiel statuta urbo kaj administra centro de la Sudmoravia Regiono.



La Esperanto-klubo de Brno estas la plej malnova en Ĉeĥio kaj eĉ en la tuta teritorio de la iama Aŭstrio-Hungario. Jam en 1901 ekestis en Brno organizita grupo de esperantistoj, kiu estis la unua en la tiama Aŭstrio-Hungario kaj tial nomis sin *Unua societo de aŭstriaj esperantistoj*.
Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA) invitis kongresi en Brno ankaŭ pro la vigla nuntempa Esperanto-grupo (la plej vigla en Ĉeĥio), kie kunvivas gravaj movadanoj kiel ekz-e Miroslav Malovec, Oldřich Arnošt Fischer, Josef Vojáček kaj la nova generacio: mezaĝaj kaj junaj aktivuloj kun alta lingvo-nivelo. La inviton subtenis ankaŭ la regiona Brna Kongresa Buroo kaj la urbo Brno mem. Por konatiĝi kun la urbo ni rekomendas ankaŭ spekti la video-registritan prezenton de Brno rekte de Mirka Tomečková, la edzino de la prezidanto de ĈEA,
J.Tomeček: https://www.youtube.com/watch?v=-hwAUOPpVD8
UEA do kongresos en Brno, Moravio, en 2025. Ĉu ankaŭ vi partoprenos? La 110-a UK estas planata por la 19-a ĝis la 26-a de julio 2025. La kongresejo estos la Universitato Mendel, la

universitato por estontaj agrikulturistoj, ĝardenistoj, ekologoj, sed ankaŭ ekonomikistoj kaj pedagogoj.

Kaj UEA rezervos specialan rabatitan kotizon por tiuj, kiuj aliĝos dum la 109-a UK okazonta en Aruŝo, Tanzanio.

gesinjoroj Mirka kaj Jiří Tomeček

## Bayreuth



En semajno de la 5-a de marto ĝis la 1-a de aprilo okazis en la germana Bayreuth 40-a Printempa Semajno Internacia Esperanta. Tiun aranĝon partoprenis 73 esperantistoj kaj komencantoj el naŭ landoj. Krom partoprenantoj el Germanio, kiuj estis plej multaj, tie estis esperantistoj el Belgio, Nederlando, Pollando, Italio, Kanado, Ĉeĥio, Slovakio, kaj de malproksima Afriko, el Benino. Inter la partoprenantoj estis ankaŭ infanoj de aĝo 4 ĝis 16 jaroj, kelkaj jam antaŭ fino de kurso interparolis en Esperanto pere de komputilludoj.

Ĉiujn antaŭtagmezojn okazis ne nur lernoprogramoj por infanoj, komencantoj kaj progresintoj, sed ankaŭ interesaj prelegoj, ludoj, manlaboroj, muziko, danco kaj sportaj agoj. Posttagmeze kelkaj partoprenantoj ripozis, grupetoj ludis tabloludojn kaj aliajn allogis bela vetero por promeno, kun gvidanto tra Bayreuth. En propono estis ankaŭ piediraj kaj aŭtobusaj ekskursoj al la Bestoĝardeno, Botanika ekologia ĝardeno, al la

Franz Lisztmuzeo kun kolekto de pianoj, kie troviĝas ankaŭ la piano de tiu granda muzikisto, al la Pramondo-muzeo, al la Opernhaus, kie somere dum 6 semajnoj estas prezentataj la operoj de Richard Wagner. Ankaŭ al la Freimaurermuzeo, tio estas ununura speciala muzeo en Germanio, kiu montras kulturan heredaĵon de la framasonoj; ĝi estas kaj muzeo kaj arkivo kaj biblioteko, troviĝas tie ĉi dokumentoj de la tempo de la fondo de la muzeo ĝis hodiaŭ.

La vesperan amuzon prizorgis la bonfama muzikisto kaj kantisto "Kaŝi" kun siaj kantoj en Esperanto, angla kaj hispana lingvoj. La duan vesperon tion faris "Jonny M", juna muzikisto, kiu kun la stilo "rege" en Esperanta lingvo travojaĝis preskaŭ ĉiujn kontinentojn.



Kun sia pupteatro por infanoj kaj plenkreskuloj Christoph Frank prezentis la ludon "Avinjo! krias Filipo". Okazis ankaŭ balo kun la temo baroko kaj opero. Sabate proksime de la tranoktejo, oni rostis kolbasojn kaj toastis kun kantado. Lastvespere estis pritakso de la tuta evento, estis publikigo de la plej bonaj fotografaĵoj kaj estis rekompenco de ludantoj kaj aktoroj. Samtempe estis anonco de la venonta, do 41- a kunveno. Okazis grandioza adiaŭo! (Sur la

bildoj estas kastoroj kaj ties „laboro“), kiuj vivas proksime de loko, kie ni loĝis.

Skribis Eva Pazourková, kuntradukis L. Srbová

## Aruŝa Dua Bulteno kaj kreskantaj aliĝoj

Aperis la Dua Bulteno por la Kongreso en Aruŝo. Kovrilbildo en PDF. Ĝi proponas eblojn mendi enloĝigon, ekskursojn kaj multon plian. Kreskas la nombro de aliĝintoj (je la 10-a de aprilo): Jam aliĝis 432 homoj el 55 landoj al la 109-a Universala Kongreso de Esperanto: Germanio 46, Francio 40, Italio 30, Korea Resp. 26, Ĉinio 26, Japanio 20, Usono 19, Belgio 17, Pollando 17, Brazilo 16, Tanzanio 15, kaj Britio 13.




El la EKO 15

Karaj samideanoj,
fine de la monato, de la 31-a de majo ĝis la 2-a de junio 2024, okazos evento organizota de krakova esperantistaro:
https://eventaservo.org/e/etagoj2024
Sabate kaj vendrede estas planotaj prelegoj kun lumbildoj, koncertoj kaj aliaj programeroj, kaj dimanĉe tuttaga ekskurso ekster Krakovo (la nombro de ekskursanoj estas limigita, do

bonvolu aliĝi sufiĉe frue).
Ni renkontiĝu en agrabla etoso kaj ĝuu interesajn programerojn!

Krakova Societo ESPERANTO

## UEA atingis 4700 individuajn membrojn en 2023

Hodiaŭ (mar 24) aperis la aprila numero de revuo *Esperanto*, kiu enhavas la finan sumon de la membraro. La nombro de la individuaj membroj kreskis kaj atingis 4700, kompare kun 4552 en la antaŭa jaro. Klare, por la nuna jaro, la celo de kvin mil individuaj membroj estas realisma celo. La Fondaĵo Canuto ege laboros kreskigi sian subtenon, sed la kresko venu el pagintaj membroj - la varia kotiztabelo ege kontribuas al tio! Laŭ vere kuraĝa elpaŝo, UEA akceptas membro-pagojn forte diferencigitajn laŭ pagipovo. La defio: 300 pliaj membroj. La celo: UEA kun kvinmil membroj!

El la EKO 14 – membrokresko por UEA.

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.